Senkulpiĝis: Yvette Goy, Laurent Burgbacher (komitatano), Félix Dudler, Mara Bartoli, Dominique Schöni, Vahid Partovinia, Nicole Margot, Pierrette Blanchet, Malte Giovanoli, Anne Johannot, Christiane Sixtus Pot.
Ĉeestis tiuj kandidataj membroj : Janet Bornand, Sonia Chatelan, Françoise Petermann.
Vizitanto : Jean-Luc Andreae

1. **La Protokolo de la lasta asembleo** estas akceptita unuanime.

2. **La prezidanto raportas.**
Teksto akceptita unuanime.

3. **La kasisto prezentas la kontojn de 2006.** Ili estas akceptitaj de 12 membroj, 2 sindetenas kaj petas prezenti alimaniere la kontojn. La situacio estas sana.

4. **La raporto de la kaskontrolantoj** estas akceptita unuanime.

5. **Demisioj kaj novaj membroj:**
Ni ricevis 5 demisiojn. Kontraŭe 8 novaj kandidatoj estas aklame akceptitaj kiel aktivaj membroj :

Janet Bornand, Sonia Chatelan, Françoise Petermann, Mauro Pasquale, Patrick Languetin, Raymond Michel, Noëlle Michel, Pietro Rotolo, Marie Hofstetter. Ili estas malŝargitaj de la kotizo 2007.

6. **La kotizoj** ne ŝanĝos kaj restas tiel: aktiva = sFr 50.- / pasiva = sFr 30.- / juna = sFr 10.- jare.

7. **Elekto de la komitato :**
La prezidanto : Dominique de Mestral, la kasisto/sekretario : Francisko Randin, kaj Laurent Burgbacher kiel respondeculo de la informilo, estas elektitaj unuanime.

Du novaj estraranoj estas proponitaj : Elisabeth de Mestral kaj Daniel Schöni Bartoli kiel liberaj membroj… ankaŭ akceptitaj unuanime.

Du kaskontrolantoj konsentas respondeci : Sonia Chatelan kaj Françoise Petermann.

8. **Proponoj kaj diversaĵoj :**
a. Francisko parolis pri kontakto kun Anne-Catherine LYON, "conseillère d'Etat vaudoise en charge de l'éducation". Ŝi proponis al la komitato prezenti raporton pri esperanto en 2007 kaj kiajn informojn LES deziras disdoni al la kantonaj lernejoj pere de ŝi.

La asembleo estas fermita de la prezidanto je la 21-a 30.

Francisko, raportisto.

Ne forgesu, ke la Inform**ilo** estas **via ilo**. Dankon pro sendado al ni de viaj originalaj artikoloj, antaŭ la 10-a de marto. La redakcio

Laŭzana Esperanto-Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22

☎ +41 (0)76 411 14 55 * 🖷 +41 (0)21 657 14 56

esperanto@isuisse.com http://www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Laŭzana Esperanto-Societo

informilo

Marto, 2007 N-ro 03

Lunde la 5-an de marto 2007

je la 20-a en la salono unuaetaĝa de la stacidomo CFF en Laŭzano.

Francisko ludigos nin per afiksoj
(prenu kun vi paperon kaj skribilon)

François nous fera jouer avec les affixes
(Prenez avec vous du papier et un crayon)

Kalendaro 2007

lun 05/03/07	Francisko ludigos nin per afiksoj (*)
lun 02/04/07	decidota (*)
lun 07/05/07	decidota (*)
24-25/06/07	enĉaleda semajnfino

(*): en la stacidomo de Laŭzano ĉe la unua etaĝo, super « La Bufedo » je la 20-a

TEMARO

Kaserolaj "Babetbabilaĵoj": Terpomaj patkuketoj parfumigitaj per rosmareno (eo)	2
Unua esperanta retsperto ! (Mara Bartoli) (eo)	3
Protokolo 2007, Ĝenerala asembleo de LES (eo)	3

Kaserolaj “ Babetbabilaĵoj ”

Terpomaj patkuketoj parfumigitaj per rosmareno

Ne miksu rosmaron (morse) kaj rosmarenon (romarin), alie mi ne certigos al vi la sukceson de tiu recepto !

Rosmareno (El la latina: Rosmarinus officinalis) signifas roso de maro. Tiu ĉiamverda tufarbusto kun vintrodaŭraj folioj kreskas ĉirkaŭ Mediteraneo. Ĝi ankaŭ ŝatas niajn ĝardenojn kaj kapablas vivi ĝis 1500 metroj. Ĝiaj violetbluaj floroj malfermiĝas jam antaŭ fino de vintro.

Ĝi estas kultivata por ornamo, esenco, spicaĵo kaj medicino. Malnovtempe, ĝi simbolis tri gravajn vivperiodojn: oni metis branĉeton en la manon de novnaskitoj por bondeziri al ili feliĉon; por certigi la trankvilecon en la alia mondo oni deponis branĉon sur la korpon de mortintoj kaj la novaj geedzoj plantis tiun planton en ĝardenon kiel signo de fideleco (laŭ nunaj statistikoj pri eksedziĝoj ŝajnas, ke multaj novparoj forgesas planti rosmarenon !...).

Legendo (14a jarcento) rakontas, ke Isabella, reĝino de Hungario, 72 jaraĝa, malsanis precipe de reumatismoj kaj pensis, ke ŝia regno jam kvazaŭ finis… Ŝi sekvis kuracadon per rosmareno. Ŝi tiom juniĝis kaj beliĝis, ke la reĝo de Pollando svatiĝis (demander en mariage) je ŝi.

Ekde tiam "Akvo de la reĝino de Hungario" estas fama (ĝi enhavas rosmarenon, lavendon kaj menton). Do, ne hezitu… tiel la esperantistoj tre tre longe daŭros…

Multaj oleoj por haŭto, haroj, bano enhavas rosmarenon. Ĝi stimulas la sangocirkuladon, kuracas muskolajn kaj artikajn reumatismojn. Ĝi bone efikas sur la digesto kaj vigligas nian korpon. Kiel spicaĵo oni aromigas multajn sudajn pladojn kiel ŝafaĵoj, kokinaĵoj, kuniklaĵoj. Ĝia parfumo, kiu elvokas iom rezinon kaj timianon, plispicos tiun bonan simplan recepton.

Kvanto por 4 personoj

kafkulero = k.k.
supkulero = s.k.

350 g.	terpomoj (tipo por pureo)
70 g.	faruno
1	granda ovo
1	ova blanko
3 s.k.	da kremo
1 s.k.	da olivoleo
5	branĉetoj de rosmareno
4	ajleroj

Preparo

En kaserolo, kuiru ĉirkaŭ 20 minutoj la lavitajn senŝeligitajn terpomojn kovritajn per akvo. Kiam ili moliĝos, ceŝu la kuiradon kaj senŝeligu ilin.

Premu ilin per forko kaj poste erigu ilin kirlile. Aldonu ovojn, salon, kremon kaj bone almiksu ĉion ĝis vi obtenos pureon.

Elprenu la rosmarenajn foliojn kaj tranĉu ilin ereten. Faru same kun ajleroj. Poste almiksu rosmarenon, ajlerojn kaj farunon en la terpoma pureo.

Formu mane aŭ kulere buletojn, kiujn vi deponos en varmigan paton, ŝmiritan per olivoleo.

Rostu tiujn kuketojn dum kelkaj minutoj ĉiuflanke mezvarme, aldonante foje iom da oleo se necesas (atentu : se la kuirvarmeco trofortas, la kuketoj brulos kaj ne iĝos krakantaj).

Deponu la jam pretigitajn patkuketojn en varman lokon (ekzemple sur fornan kradon) kaj rekomencu la kuiradon de la ceteraj buletoj.

Servu ilin kun salato, fungoj en saŭco aŭ ŝafaĵo.

Bonan apetiton !
Elisabeth de Mestral

Unua esperanta retsperto !

Mi rakontis dum la lasta babilada rondo, ke mi nun serioze eklernos esperanton, ĉu ne? Sed kiel lerni sen tediĝi kun komplikaj tekstoj aŭ gramatikaj reguloj? Paroli kun mia edzo? Kiam : de noktomezo al la dua ?!
Babili kun miaj infanoj ne estas vere interese, ili aŭskultas longe nur se mi uzas fivortojn… Jes, mi havis ideon !
Mi volas retparoli kun la tuta mondo, almenaŭ kun ĉinulo... do mi decidis "tiuvespere mi retbabilados!" Sed mi samtempe timas kaj ĝojas... hodiaŭ mi enlitigos frue la infanojn.

Fine, jen la grandega evento. Mi preparas min tuje; nur iri al necesejo, prepari bonan teon, kremŝmiri la manojn, alĝustigi la seĝon, serĉi la vortaron (kaj la "kison" (gramatika faldfolio kun bildo de kiso sur la unua paĝo), kiel memori la pronomojn?) kaj mi estas preta !

Tute fiera pri mia aŭtonomeco mi trovis rapide la bonan retadreson. Alklaki ĉi tie, alklaki dekstre - estas facile, kaj nun la komputilo diras al mi : "Enmetu kromnomon..." DANIEL ! Helpu min ! Kio estas kromnomo, ĉu dangera ? Mia karulo klarigas al mi kelkajn retsekretojn kaj unu horon poste mi komencas vere.

Mi estas sur la babiladopaĝo kun aliaj esperantistoj (ĉu tiuj vidas ke mi estas komencanto?). Kion diri? Se mi demandas tro multe, estas pridemandaro, se mi ne parolas ili ne vidas min… pli kaj pli interparoladeto komencas. Mi renkontas agrablan junulon kaj ni interŝanĝas frazojn (se mi diras ke ni diskutas, estas iomete troa). Ni pasigis bonan momenton. Nun la demando (ĉinulo, afrikulo, amerikulo, eble lando kiun mi ne konas ?):

- Kie vi vivas ?
- Mi estas Svislandano.

(kiel pugno al la kapo)

- Amuza, ankaŭ mi.
- Mi vivas en la germana parto de Svislando.

(mi vekiĝis)

- Amuza, ankaŭ mi vivis tien.

(granda paŭzo)

- Ni povus paroli en svislando-dialekto, sed mi deziras progresi en esperanto !
- Ankaŭ mi !

(uf!)

Kelkajn frazojn poste ni salutas nin. Ĝis !

Mara Bartoli

Protokolo 2007
Ĝenerala asembleo de LES

Okazis la 12-an de februaro 2007 en la unuaetaĝa salono de la bufedo CFF en Laŭzano

Ĉeestis tiuj aktivaj membroj : David Bühlmann, Nancy Fontannaz, Jaqueline Vasserot, Charlotte Blanc Maillard, Claude Blanc, Marguerite Jaccard, Lucienne Dovat, Rosario Scopelliti, Christiane Andreae, Elisabeth de Mestral, Daniel Schöni, Dominique de Mestral (prezidanto), François Randin (sekretario / kasisto)
Ĉeestis tiu pasiva membro : Arlette Di Vetta